

Leterkesto : geografia nomenklatur  
Claude Gacond, 320-a radioprelego, 1969.11.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Komence de tiu elsendo ni salutas gesinjorojn B. Najbaro en Keighley, Britio, gesinjorojn J. Dony en Troyes, Francio kaj sinjoron Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, kiuj esprimis sian interesiĝon pri la alvoko al la svisa esperantistaro por la kreo de Kultura Centro Esperantista. Ni sendis al ili la tekston de tiu alvoko.

A.- En Budapeŝto, Hungario, ni salutas sinjoron Pal Balkanyi, kiu tre interesiĝis pri niaj prelegoj pri Gandhi. Okaze de la jaro Gandhi li ŝatus prelegi pri tiu temo en la grupo en Budapeŝto. Ni sendas al li la libron de Edmond Privat *Vivo de Gandhi* petante la reciprokan sendon de samvalora libro.

Cl.- Multaj SAT-kongresanoj skribis al ni el Novi Sad. Ni dankas tiujn 51 subskribintojn, inter kiuj ni retrovis la nomojn de regulaj radio-korespondantoj.

A.- En Bogoy, Norvegio, ni salutas Otto Prytz, kiu skribis al ni longan kaj interesan leteron. Li faris demandon pri la geografia nomenklatur, al kiu ni respondas :

Cl.- Sinjoro Otto Prytz skribis :

A.- « *Vi ŝajnas proponi, ke ni konservu la geografiajn nomojn tiajn, kiaj ili estas prononcataj en la koncerna nacia lingvo, kaj mi certgrade konsentas. Tamen koncerne landnomojn tio fariĝus en kelkaj kazoj malkonvena. Internacia publiko eble konjektas, ke **Norge** estas la sama kiel **Norvegio**, sed nur tre malmultaj homoj scias, ke **Màdjarorsag** estas la sama kiel **Hungarlando**. Same la rivero **Danubo** havas multajn nacilingvajn nomojn, kaj povus ekesti kverelo pri la plej taŭga maniero nomi ĝin en Esperanto. Cetere, ĉu oni diru en Esperanto **Ĵnev**, **Genf**, **Ĝinevra** aŭ **Ĝenevo**? Ĉiuj emas asimili la geografiajn nomojn el siaj gepatraj lingvoj, kaj kvankam la esperantistoj eble ekscese faris la samon, mi ne vidas grandan danĝeron en modera asimilo de la geografiaj nomoj en esperanto. »*

Cl.- Tiuj demandoj de nia norvega aŭskultanto pravas la limojn de niaj radio-eblecoj. Ni faris serion da prelegoj pri la temo geografia nomenklatur. En kelkaj prelegoj ni parolis pri la land-nomoj. Ni provis raporti pri la nunaj tendencoj en la esperantigo de la geografia nomenklatur. Estas neniam dubo, ke la esperantigo de la landnomoj estas necesa. Same estas por la plej gravaj riveroj, montoj, kontinentaj regionoj, maroj, ĉefaj urboj.

A.- Sed ni esprimis la deziron, ke tiu esperantigo respektu minimuman universalecon. Pro tio ni kritikis la esperantigon, kiam ĝi kripligas universale akceptatajn formojn.

Cl.- Ni provos rapide reparoli pri tiu temo per aliaj vortoj.

A.- Unue ni devas distingi inter komunaj nomoj kaj propraj nomoj.

Cl.- Se en esperanto ĉiuj komunaj nomoj finiĝas per **o**, tio ne estas vera por la propraj nomoj. Pli kaj pli la nomoj de personoj ne plu estas esperantigitaj. La virinaj nomoj ofte finiĝas per **a**.

A.- Kial la geografiaj nomoj devus sisteme finiĝi per **o** ? Tiurilate ni kritikis la *Mondmapon* eldonitan de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Kiel ĉiuj esperantistoj ni sentas la bezonon al normigo, sed ni pensas, ke ĝi devas esti la rezulto de malpli amatora laboro.

Cl.- Tiun ĉi jaron la UEA-anoj kongresis en Helsinko kaj la SAT-anoj en Novi Sad. Nek la unuaj, nek la duaj esperantigis tiujn urbnomojn. En la dokumentoj de UEA Helsinko restis Helsinko, en tiuj de SAT Novi Sad restis Novi Sad. Kial sur la *Mondmapo* de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj tiam Helsinko iĝis **Helsinko** ?

Leterkesto : geografia nomenklatur  
Claude Gacond, 320-a radioprelego, 1969.11.26 & 29

A.- Ni prenas tiun urbnomon kiel ekzemplon, ĉar ĝi bone difinas nian pozicion. Ĉu la anoj de tiu urbo estas **Helsinkanoj** aŭ **Helsinkianoj** ? Ni scias, ke la plimulto de la esperantistoj preferas la formon **Helsinkianoj**.

Cl.- Kiam geografiaj nomoj finiĝas per vokalo, ni devas treege atenti pri ĝi. Ne necese ni devas ĝin anstataŭi per nia substantiva finiĝo **o**. Se ni deziras indiki, ke la nomo Helsinki estas substantivo, ni povas aldoni la substantivan **o** kaj diri **Helsinkio**. Sed ĉu tiu finiĝo **o** estas vere necesa por la geografiaj nomoj ?

A.- Ekzistas nomoj, kiuj universale finiĝas por **o**. Ni donu kiel ekzemplon la urbon **Oslo**. Nun, ĉu la loĝantoj estas **Oslanoj** aŭ **Osloanoj** ? Eble sinjoro Otto Prytz, kiu estas norvego, povos esprimi sian vidpunkton. Se oni elektas la formon **Oslanoj**, la urb-radiko estas **Osl**, kaj la **o** estas la substantiva finiĝo, se oni elektas la formon **Osloanoj**, la urb-radiko estas **Oslo**. La fina **o** apartenas al la radiko.

Cl.- Ni ege bezonas geografian radikaron, tio signifas liston de la geografiaj nomoj sen la substantiva finiĝo **o**. Sed tiu laboro devus esti la rezulto de debato en kiu oni difinus, kio estas esperantigo : ĉu simpla transskribo per la alfabetaj literoj de la geografiaj nomoj, ĉu transformo de tiuj geografiaj nomoj laŭ iuj principoj ? Se la esperantigo estas transformo, ni devas koni la principojn de tiu transformo.

A.- La esperantigo de la *Mondmapo* eldonita de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj estas akcepteblaj, kiam ili kodigas formojn kiel **Danub**, **Rejn**, **Pariz**, **London**, kies substantivoj estas **Danubo**, **Rejno**, **Parizo**, **Londono**, adjektivoj **danuba**, **rejna**, **pariza**, **londona**, kies loĝantoj estas **danubanoj**, **rejnanoj**, **parizanoj**, **londonanoj**, kaj tiel plu.

Cl.- Sed aliaj esperantigoj de la *Mondmapo* de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj trudas formojn, kiujn povas akcepti nur ekstremuloj. Tiam, anstataŭ helpi al la kodigo de la geografia nomenklatur, tiuj esperantigoj kreas konfuzojn, kiuj povus endanĝerigi la evoluon mem de nia lingvo.

A.- Ke la esperantistoj emas uzi geografiajn nomojn, kiujn ili povas skribi per esperantaj literoj kaj facile prononci, tio estas prava. Sed pri la elekto de tiuj formoj ili devas interkonsenti. Se ili ne povas interkonsenti, tiam ni havas la pruvon, ke la koncernaj formoj proponitaj ne estas la rezulto de ĝisfunda studo.

Cl.- Antaŭ ol konsenti pri la detaloj, ni devas unue ekkonsenti pri la principoj mem de la normigo de la geografiaj nomoj.

A.- Studante la *Mondmapon* de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj ni vane serĉis tiujn principojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-